
Aŭstraliaj Esperantistoj



Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Lingvoilo *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro*

PLENUMITA 30/03/2017 Tricentdekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)



Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale



SENDATA AL 325. La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

Oni povos metu siajn nomon, retadreson, kaj nomon de siaj lando kaj urbo al la ricevanta listo rspring@tpg.com.au

Ekstudis pli ol **785,000** lernantoj en la Esperanto-kurso de Duolingo. https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online (Ekde la 28a de Majo 2015)

La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine

★★★

GRAMATIKA EKZERCO. 14.



La tria maniero por difini la kernon estas per plena subfrazo, subpropozicio. Jen ekzemploj: 1). La fiŝoj, KIUJN ŜI ACETIS HIERAŬ (Subj.), estas nun en la akvario, KIU DEVAS REGULE FREŜIGATI KAJ PURIGATI (Adjekto). 2). La viro, KIES NOMON MI FORGESIS (Subj.), ŝtelis mian aŭtomobilon, KIUN MI ANTAŬE RESTIGIS EN AŬTOSTRATRESTEJO (Obj.), kaj veturis tre rapide, PRI KIO MI TIMIS (Adj.). 3). Tio, KIO ESTAS EN LA SKATOLO, (Subj.) apartenas al, T.E. POSEDATAS (Pred.) de mia onklo.

Eĉ vortoj en la kernon difinanta frazo povas siavice ricevi pliajn difinantojn: "La leonoj, kiuj nun loĝas en la kaĝo, KIUN ONI ĴUS FINKONSTRUIS, blekegas tiom laŭte, ke tio vekas la dromedarojn, KIUJ NORMALE NUN DORMAS" (Adjekto el de "tiom laŭte").

Marcel Leereveld.

★★★



La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian Sabatojn je la 10atm.

Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagata kafo



La 1a de Aprilo estos la unua Sabato. Venu

Mi ĉeestas tiun bonan Esperantan klubon kaj raportas al AE pri la klubo. Roger Springer

(Por havi raporton en AE, via klubo bezonas sendi informon/raporton al AE)

★★★

Komentoj pri novaĵoj aperintaj en AE

Responde al la artikolo de Chris Hollis pri la libro/ filmo "La usonano", mi devas agnoski ke mi ne tre ŝatas kiam verkisto parolas pri Esperanto en tiu maniero . Li kontribuas al semado de la ideo ke Esperanto estas galimatio, komunikilo, kiu neniam atingis la nivelon de klara kaj utila komunikrimedo.

Mi taksas tiun rimarkon ofenda kaj malrespekta al Esperanto nome de ignoranto de Esperanto, kies konoj baziĝas sur onidiroj. Ĉiu devas iam lerni lingvon, neniu naskiĝis parolante iun ajn lingvon. Eble vi estas en tiu etapo de lernado , kiam vi multe eraras, sed levu la manon, tiu kiu neniam eraras. Sen eraro ne estas progreso.



Franciska Toubale

Falfoliaj kaj daŭrfoliaj plantoj

Aperis en AE 302-305 komentoj de Marcel Leereveld kaj Terry Manley pri la termino **falfolia** kaj rilataj aferoj. Post pripensado, mi volas kontribui miajn pensojn al la diskuto. Unue mi prezentas informon pri la temo.

Ref: https://eo.wikipedia.org/wiki/Falfolia_planto Jen la enkonduko el la artikolo:

> **Falfolia** aŭ **decidua** planto estas tia arbo, arbusto aŭ staŭdo, kiu faligas siajn foliojn en parto de la jaro. Tio okazas vintre en la kontinenta klimato kaj la arkta klimato. En aliaj areoj, folifalado okazas pro ŝanĝiĝo (malpliiĝo) de la precipitaĵa kvanto.
>
> Male al la falfoliaj plantoj, ekzistas **ĉiamverdaj** plantoj, ĉe kiuj la verda foliaro ekzistas en la tuta jaro. Inter la du randaj kategorioj, ekzistas la **duonfalfoliaj** plantoj, ĉe kiuj la malnovaj foliaj defalas post komenciĝo de la nova vegeta periodo. Same ekzistas la **duonĉiamverdaj plantoj**, kiuj defaligas plimulton de siaj folioj, sed restas iom da folioj dum la vintra aŭ seka periodo. Sur kelkaj junaj arboj (ekz. Usona marĉa kverko), la sekiĝintaj folioj restas dumvintre, verŝajne pro defendo kontraŭ la damaĝantoj.

Programita ĉelmortado

Ref: https://www.scientificamerican.com/article/why-does-programmed-cell/ Jen mia esperantlingva resumo de la artikolo:

> Programita ĉelmortado (apoptozo) okazas en bestoj kaj en plantoj. Ĉelmortado videble okazas kiam arboj faligas siajn foliojn en la aŭtuno, aŭ en la seka sezono en varmegaj landoj. La vorto **apoptozo** devenas de la greka vorto ἀπόπτωσις, kiu signifas defal(ad)o. (Simile ĉe kalviĝantaj viroj okazas apoptozo). Ankaŭ ĉiuj ĉeloj en infektita planta parto povas mortigi sin por haltigi la disvastiĝon de la malsano.

Esperantaj terminoj kaj difinoj el NPIV

decidua: defalema (de la latina lingvo: dēcĭdĕre = defali)

falfolia: havanta defalemajn foliojn, kiuj ĝenerale vintre defalas (vivantajn malpli ol unu jaro)

daŭrafolia: havanta foliojn, kiuj ne defalas en vintro (vivantaj 2-5 jarojn)

ĉiamverda: havanta ne deciduajn foliojn

Alilingvaj terminoj por decidua

Ref: https://en.wikipedia.org/wiki/Deciduous). Mi ne estas spertulo pri ĉi tiuj lingvoj sed mi trovis la jenajn signifojn helpate de Guglo (translate.google.com):

lingvo	vorto	signifo
afrikansa	bladwisselend	folio-"ŝanĝa"; tio estas, la foliojn "cikle defaliganta kaj rekreskiganta"
angla	deciduous	decidua
dana	løvfældende	folio-faliga
franca	décidu	decidua
	á feuilles caduques	kun folioj falaj
	á feuillage caduc	kun foliaro fala
	caducifolié	falfolia
germana	laubabwerfend	foliaro-defaliga
	laubwechselnd	foliaro-"ŝanĝa"; tio estas, la foliaron "cikle defaliganta kaj rekreskiganta"
hispana	caducifolio	falfolia
hungara	lombhullató	foliaro-defaliga
maoria	rauhoro	folio-fala
nederlanda	bladverliezend	folio-perda
rusa	листопáдный	folio-defala

Diskuto

Ni notu, ke pluraj eŭropaj lingvoj, kaj la maoria lingvo, uzas sian version de **falfolia**. Do se **falfolia** estas sensencaĵo, ankaŭ la aliaj lingvoj havas siajn sensencajn vortojn por ĉi tiu koncepto.

Kiel Marcel informis en kelkaj artikoloj en AE pri vortformado en Esperanto, kunmetitaj vortoj ofte prenas pli specialan signifon ol aspektas laŭ la radikoj uzataj. Ekzemple, **telerotuko** estas tuko de maldika sorbema tolo por viŝi telerojn, glasojn, manĝiloj, potojn ktp; kaj **bantuko** estas pli dika, mola, sorbema tolo por sekigi homan korpon post banado aŭ duŝado. Ne necesas skribi **korposekiga postbana tuko** aŭ io tiel detala**.**

Se **falfolia** ne taŭgas en iu kunteksto, oni povas uzi la pli precizan vorton **falfoliara** proponita de Terry Manley aŭ la internacie akceptitan sciencan terminon **decidua**.

En mia ĝardeno en nia antaŭa domo, ni kreskigis arbustojn nomitajn *Photinia*. Ili kreskigas ruĝajn foliojn printempe, kiuj donas al la arbustoj ruĝan aspekton, ĉar la novaj folioj ĝenerale kreskas ekster la malnovaj, sed poste la ruĝaj folioj verdiĝas. Ĝi ne estas decidua, sed mi hezitas diri ke ĝi estas **ĉiamverda**. Multaj plantoj ne estas verdaj; kaj, el ili, multaj ne estas deciduaj. Tial mi preferas la terminon **daŭrfolia** (laŭ PIV) aŭ **daŭrafolia** (laŭ NPIV).

Deciduaj plantoj faligas siajn foliojn relative subite, kiam la planto sensas, ke temperaturo, sekeco aŭ aliaj faktoroj indikas ke la ĝusta sezono alvenis. Folioj ĉe daŭrfoliaj plantoj vivas ĝis kelkaj jaroj, kaj ili mortas kaj falas tra longa parto de la jaro.

Ni povas kritiki vortaristojn pro iliaj vortelektoj, sed ni memoru ke la kunaŭtoroj kaj reviziantoj ofte scias multe pli pri sia fako ol ni.

Mi agnoskas la helpon de Vilĉo Aldridge (antaŭa ĉeftradukisto ĉe la novzelanda ministrejo pri enlandaj aferoj; kaj—jam dum 50 jaroj—tradukisto pri sciencaj kaj teĥnikaj aferoj).

Donald Rogers

★★★

Saluto kaj peto el Germanujo

Perdita Amiko David Poulson

Sinjorino Helga Plötner donis al mi vian adreson. Mi vivis en GDR. Tiam mi estis feliĉa, havi leteramikon en Australia Li estas David Poulson. Li skribis, ke li intencas trovi alian loĝlokon. (Ni devis skribi leterojn, paperajn kaj forsendi ilin per poŝto) Ni devis atendi semajnojn je respondo. Mia amiko ŝanĝis la adreson. Sed tiu ankoraŭ ne estis la fina. Intertempe ankaŭ mi iris al alia regiono en Germanio. Krome la leterportisto estis ŝanĝita. Ne plu eblis komuniki.

Mia nomo tiam estis Christa Ziemann, mi loĝis en la sama urbo kiel nun. Sed tiam ĝi havis la nomon de Karl Marks. La strato portis la nomon de Juri Gagarin. Kiam mi havis la eblecon viziti Australion, mi intencis renkonti la amikon. Sed mi devis ekscii, ke nun li vivas en Thailand.
Ĉu eblas al vi trovi lin? Korajn salutojn Christa Koß

★★

La revo de Karlo la Granda.



Ankaŭ mi revis kaj revas, en Aŭstralio, pri la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo, kiel nun en la ĉielo Karlo la Granda revas pri la efektiviĝo de la Eŭropa Unio. Dum la ĵusaj kelkaj jaroj okazis en Eŭropo politikaj disvolviĝoj kiuj malhelpas la pluan kreskadon de la Eŭropa Unio. Mi citas la malfortan financan staton de kelkaj el la membro-ŝtatoj kun la preskaŭa eliro de Grekujo, la malamikecojn pro la malsamaj opinioj pri la grandskala invado de la multaj enmigrantoj el aliaj kontinentoj, kaj la eliron de Britujo. Multaj eŭropanoj pro tio perdas la idealon de la Eŭropa Unio.

Krome pure psiĥologia kaŭzo estas laŭ mia opinio la manko de komuna lingvo neŭtrala. Karlo la Granda estis pli sukcesa, ĉar liajn landojn helpis unuige la internacispirita katolika eklezio kun sia unu neŭtrala lingvo, Latino. Kaj krome la plej granda parto de la loĝantaroj ne bezonis interrilati kaj ne havis la potencon por demokrate partopreni en la unueco. Kaj la akso de la unio estis Germanujo kaj Francujo, ĉilasta lando de ĝermanaj triboj kun latinida lingvo.

En la nuna situacio ĉiu eŭropano forte sentas ke lia aŭ ŝia lingvo ne estas tiu de la aliaj landoj. Komuna lingvo profunde sentigus la eŭropanon esti kunmembro de granda popolo. Sed la lingvo devus esti neŭtrala, ne apartenanta al iu eŭropa popolo aŭ nacio, nek al alikontinenta popolo aŭ lando. Se oni estus akceptinta artefaritan lingvon kiel la eŭropan, mi estas certa ke la popoloj sentus sin nun pli unuigitaj kaj malpli emus forlasi la Eŭropan Union. Kompreneble aliaj, eble pli fortaj, problemoj tamen splitus la Union, sed ekzemple Esperanto estus helpinta la eviton.

Uzi la anglan lingvon kiel eŭropan lingvon kaŭzas ke multaj eŭropanoj sentas sin, konscie aŭ ne, esti kolonio de Britujo aŭ de Usono, ĉar lingve ili ĉiam estas la malsuperuloj de la angloj kaj de la usonanoj, kaj tial la koloniitoj. Kaj krome tiu fremda angla lingvo tendencas spliti la anojn de ĉiu el la aliaj eŭropaj landoj en avantaĝan parton, kiu sufiĉe flue parolas la anglan, kaj en malavantaĝan parton, kiu ne facile lernas aŭ kapablas uzi la anglan, kaj kiu parto de la popolo komencas ĵaluze malami la anglolingve pli sukcesan parton de la popolo. Klaras ke tiu parto, do pro la angla lingvo, perdas la idealon de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo. Kun Esperanto tio ne estus la kazo, aŭ multe malpli, ĉar ĝi estas tiom multe pli facile lernebla lingvo ol la senespere komplika kaj malklara lingvo angla.

Jes, mi scias, ke ni ne plu havus Esperanton kiel internacian lingvon neŭtralan, sed eble pli gravas havi unu Eŭropon kun sia nacia lingvo Esperanto ol havi neŭtralan lingvon internacian, kiun ni ja povus ankoraŭ krei.

Marcel Leereveld.

★★

Bob Felby Mia infanaĝo (1)



La 11-a de Julio estas speciale grava tago por mi. Tiun tagon dum mia tuta vivo mi ricevas gratulkartojn kaj donacaĵojn. Kaj stranga koincido, ĉu ne? Mi naskiĝis tiun saman tagon jam je la dua horo dum tre varmega nokto en Kopenhago. Kiam la akuŝistino demandis mian du jarojn pli aĝan fratinon, Gerda, ĉu ŝi preferas frateton aŭ fratineton, tiu respondis, “mi preferas glaciaĵon”. Tiom varmege estis tiun nokton.

Nu, kvankam mi naskiĝis en unu el la plej belaj urboj, almenaŭ eŭropaj, vi certe ne kredu, ke mi naskiĝis en unu el ĝiaj plej belaj kvartaloj. Fakte mi naskiĝis en “Tøndergade”, “Tønder” estas urbo historia en Sudjutlando, kaj “gade”, aŭ ”gate” kiel oni diras en Norvegujo, “gata” en Svedujo, signifas nur straton. Ĝi ne signifas, kiel oni erare supozas en la nordangla urbo “Jorko”, pordegon! Tiu strato troviĝas en la kvartalo “Vesterbro”, t.e. okcidenta parto.

Ni loĝis en la teretaĝo de kvaretaĝa domo konsistanta el multaj luloĝejoj. Estis tre praktike tie, la tutan someron oni lasas la fenestron malfermita, kaj gastoj kaj vizitantoj starigas la biciklojn ĉe la muro, kaj eniras tra la fenestro. Tio okazas ankoraŭ nuntempe, ĉar okcidentkopenhaganoj estas tre gastemaj. Ofte estis en la domo malplenaj luloĝejoj, ĉar kvankam la luprezo ne estis alta, tamen ne estis multaj, kiuj povis pagi ĝin. Loĝis tie nur malriĉuloj, same kiel hodiaŭ. Kompreneble en aliaj partoj de Vesterbro loĝas riĉuloj. Ili sin vivtenas per la laboro de la malriĉuloj, sed ili ne estas tre multaj; do ni ne parolu pri ili!

Kvardek ok tagojn post mia naskiĝo oni decidis bapti min. Mi ne scias, ĉu oni timis, ke mia vivo fariĝos tre mallonga, ĉar mi suferis pro rakito, kiu misformis miajn ostojn. Mi supozas, ke mia patrino ne estis manĝinta sufiĉe da legomoj kaj fruktoj dum sia gravedeco. Espereble mi mem nuntempe faras tion, kvankam mi preferas dolĉaĵojn!

Mi baptiĝis en “Kristkirken”, t.e. preĝejo de Kristo, luterana preĝejo sur “Enghave Plads”, t.e. Placo de herboĝardeno. Neniu demandis min, ĉu mi volonte estos luterano; tiutempe aliaj faris la decidojn por mi. Miaj geonkloj Egil kaj Thora, donacis al mi arĝentan kuleron kun mia nomo “Robert” gravuritan dorse sur ĝi kun la dato de mia baptiĝo, la 28-a de Julio 1932. Mi ne plu havas tiun kuleron. Ĝi mankas al mi, ĉar ĝi enhavis la postsignojn de miaj unuaj dentoj. Evidente tre plaĉis al mi mordi ĝin. *Bob Felby*



La Melburna Esperanto-Asocio


Semajna raporto de Melburno



BUDO ĈE KULTURA FOIRO

Sabaton la 18an de Marto ni havis por la tria sisekva jaro budon (senpagan) ĉe la Komunuma Kultura Foiro, kiu estas parto de Multkultura Semajno. Ni montris niajn du novajn reklamilojn, havis librojn por vendi, informojn por disdoni (haveblaj ĉi tie se vi ŝatas uzi ilin) kaj eĉ havis interagan blanktabulon kie homoj povas krei sian propran vorton per magnetaj vortpartoj.





Bedaŭrinde, kiel en pasintaj jaroj, la kerno de la okazaĵo estis muzikaj kaj dancaj spektakloj, kaj la bruo de tiuj plejparte malebligis paroladon. Estis malpli da budoj ĉi jare kaj mi suspektas ke tio estas kial. Post la fino de la foiro, manpleno da homoj venis kaj petis informon sed krom tio mi ne taksas ĝin sukceso.
Refoje mi havis la demandon "ĉu ĝi estas la hispana?" kaj ankaŭ ŝercema viro diris ke li ekpensis ke li povus aĉeti kafon de ni (*Esp*resso). Post la foiro mi parolis kun unu el la muzikistoj, kiu diris ke lia patrino lernis Esperanton.


Afrikaj tamburistoj

JARKUNVENO
Lundon la 20an de Marto 14 homoj ĉeestis la jarkunvenon de la Melburna Esperanto-Asocio. Ni ĝuis iom da babilado, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj antaŭ ol la komenco de la grava parto de la vespero. Sukcesis propono por sendi semajnajn raportojn pri nia agado al Aŭstraliaj Esperantistoj. Poste ni elektis la estraron, kiu plejparte estas sama kiel antaŭe, kun nur interŝanĝo inter la prezidanto kaj vicprezidanto. Do la nova estraro estas: Prezidanto – Joanne Johns, vicprezidanto – Marcel Leereveld, sekretario – Esther Parris, kasisto – Heather Heldzingen, bibliotekisto – Tristan McLeay. Gratulon al la novaj estraranoj.



LUDVESPERO
Sabaton la 25an de Marto ses homoj kunvenis por nia monata ludvespero ĉe "Alchemists Refuge" trinkejo en la urbocentro. La ludoj, kiujn ni ludis ĉi foje estis: "Friday the 13th", "Hanabi", kaj "Mysterium" - ĉiuj ludeblaj en iu ajn lingvo.

DIMANĈA KUNVENO
Dimanĉon la 26an de Marto sep homoj kunvenis ĉe "Cafe Beer Deluxe" en Federation Square. Ni babilis kaj faris vortserĉan ekzercon pri manĝoj kaj kuirado.

LUNDA KUNVENO
Lundon la 27an de Marto ses homoj kunvenis ĉe "Ross House" en la urbocentro. Ni planis estontajn kunvenojn, babilis kaj faris vortserĉan ekzercon pri manĝoj kaj kuirado.

VENONTAJ KUNVENOJ

Dimanĉon 2an de Aprilo je 15:00	Kunveno por komencantoj ĉe Cafe Beer Deluxe, Federation Square
Lundon 3an de Aprilo je 18:30	Lunda kunveno ĉe Ross House, 247 Flinders Lane
Sabaton 8an de Aprilo je 10:00	Biciklado de Melburno ĝis Williamstown por tagmanĝo (kaj revene)
Sabaton 15an de Aprilo je 12:30	Pikniko por memorigi la 100an datrevenon de la morto de Zamenhof, en Batman Park en la urbocentro, apud la rivero.
Sabaton 29an de Aprilo je 19:00	Ludvespero ĉe Alchemists Refuge, 328 Little Lonsdale Street

NUNAJ SEKVANTOJ (Alklaku la nomon por iĝi plua!)

Meetup – 702	Instagram – 49
Facebook – 284	Telegram – 17
Twitter – 200	

Joanne Johns

LA SIMPLECO DE ESPERANTO.



Ĉiuj opinias, ke Esperanto devas esti tiom simpla kiom eblas. Ĝi tamen devas povi esprimi ĉiujn pensnuancojn, kiel ja faras etnaj lingvoj. Ĉar lingvo estas tre komplika kaj tre malfacila afero, eĉ la simpleco de Esperanto estas relative komplika kaj malfacila. Temas do pri tiomeblo en komparo kun aliaj lingvoj, etnaj aŭ artefaritaj. Pro komparo mi opinias, ke Esperanto estas, por sia celo, perfekta kaj simpla. Dirante tion, mi celas la Esperanton tian kia ĝi devas esti uzata, ne necese la Esperanton parolatan de la Esperantistoj.

Ekzistas kelkaj Esperantistoj kiuj opinias ke Esperanto ne estas sufiĉe perfekta kaj povus esti pli simpla. Ili malpravas, ĉar neniu homo kreis lingvon pli simplan kaj tamen perfektan. Kaj mi opinias, ke tiaj Esperantistoj eble faras malservon al la lingvo konigi ĝin tia al la ekstera mondo, kiu tiel ekhavus malĝustan opinion pri Esperanto.
Tiuj pesimistoj penas pruvi, ke oni povas plisimpligi kelkajn aspektojn de Esperanto. Sed en ĉiuj tiaj kazoj ne temas pri simpligo, sed pri same simpla alternativo. Jen kelkaj el iliaj pruvpenoj, plejofte prenitaj el iuj etnaj lingvoj.

1e. Ne uzi la artikolon “la”. Sed tio estas nur alternativo, ĉar en tiu kazo oni devus uzi ion alian por montri ke temas pri io difinita konata de KAJ la parolanto KAJ la alparolato, ekz. la vortoj tiu aŭ ĉiu aŭ tia, aŭ la vorto “menciita”.

2e. Ne uzi la tempfinaĵojn de la verbo. Sed la lingvoj kiuj faras tion devas per aliaj manieroj certigi ke temas pri kiu tempo, ekz. ripeti vorton kia antaŭe aŭ hieraŭ aŭ nun aŭ estonte, por certigi ke plu temas pri komencita certa tempo. Do temas ree pri alternativo eble, nur eble, same simpla.

3e. Ne uzi la pluralon. Ankaŭ ĉi tie oni devas alternative ekzemple duobligi la vorton aŭ jam antaŭe iel klarigi ke temas pri pluralo.

4e. Ne uzi adverbojn, sed nur adjektivojn. Ankaŭ tio eblas, kiel montras la nederlanda lingvo. Sed tio necesigas en pluraj kazoj aliaranĝi la frazon, do alternative.

5e. Oni povus forigi la (ja malfacilan) predikativon, kiu ne ekzistas en multaj lingvoj. Sed oni devas en tiuj aliaj lingvoj iel montri la diferencon inter “Mi kolorigas la domon blankan kaj Mi kolorigas la domon blanka”.

6e. Oni povus senigi sin de la ses participoj, sed bezonus uzu aliajn manierojn por ekzemple montri la diferencon inter “Mi legis ŝian leteron” kaj “Mi estis leganta ŝian leteron”.


7e. Oni povus havi nur unu gramatikan voĉon anstataŭ la kvar. Sed ree oni devus serĉi aliajn esprimojn alternativajn, aŭ oni devus ne esprimi la nuancojn de la bildo. Oni tiam do malriĉigus la bildojn esprimatajn de la lingvo.

8e. Oni povus ne havi la akuzativon, kiel la angla, sed devus tiam krei pliajn prepoziciojn, kiel en la angla, aŭ doni al la gramatika Objekto firman lokon en la frazo. Do ree temas pri alternativoj ne pli simplaj.

9a. Oni povus ne havi pli ol unu aŭ du prepoziciojn, sed devus tiam multe plilongigi multajn frazojn, aŭ devus uzi pliajn sufiksojn, kiel en la hungara.

10e. Oni povus unuvortigi ĉiun frazon, tiel farante la lingvon tre simpla, sed pli malfacile komprenebla kaj malpli klara.

Do kvankam oni povus alimaniere krei la lingvon simpla, tio estus nur uzi alternativojn, do ne simpligojn. Tial mi plu juĝas Esperanton la plej simpla ebleco de internacia lingvo, kaj juĝas ĝin esti perfekta. Longe vivu la origina kaj genia lingvo de la genia Zamenhof!



Marcel Leereveld.

Nia mondo ŝanĝiĝas. Havajo alproksimiĝas Japanujon per 10 centimetroj jare

Movado sen Nomo

Novaĵletero Aprilo 2017

1. Slogano por Aprilo - Majo - Junio 2017

1 donaco = 2 x feliĉo

Aprilo 2017

Lu	Ma	Me	Ĵa	Ve	Sa	Di
					1	2
3	4	5	6	7	8	9
10	11	12	13	14	15	16
17	18	19	20	21	22	23
24	25	26	27	28	29	30

Majo 2017

Lu	Ma	Me	Ĵa	Ve	Sa	Di
1	2	3	4	5	6	7
8	9	10	11	12	13	14
15	16	17	18	19	20	21
22	23	24	25	26	27	28
29	30	31				

Junio 2017

Lu	Ma	Me	Ĵa	Ve	Sa	Di
			1	2	3	4
5	6	7	8	9	10	11
12	13	14	15	16	17	18
19	20	21	22	23	24	25
26	27	28	29	30		



http://www.movado-sen-nomo.net/

Kiam oni donacas elkore, 2 personoj feliĉas: nome ne nur tiu kiu ricevas, sed ankaŭ tiu kiu donacas. Ne devas esti multekostaj donacoj, sed elkoraj donacoj. Mem baki kukon, oferti memfaritan konfitaĵon, ankaŭ tio eblas, kaj estas pli persona donaco ol bele pakita, sed rapide aĉetita objekto sen ajna persona trajto!

Solvo de Kvizo 3: Vi lernis, ke en Esperanto ekzistas duonaglutina kunmeto de substantivo kun sia adjektivo, sed ebla nur se la rezulto estas adjektivo aŭ adverbo, ekz. "bruna okulo" fariĝas "brunokula" kaj ne eblas "brunokulo". La samo okazas en la aglutina angla lingvo: el brown plus eye ne eblas browneye sed jes la adjektivo "browneyey" en kiu "y" uzatas por fari adjektivojn. Sed la angla lingvo ne ŝatas la adjektivan finaĵon "y" en kelkaj vortoj, do inventis alternativan finaĵon "-ed" por tiuj duonaglutinaj kunmetaĵoj. Ĝi ne rilatas al la participa finaĵo "-ed" de verbo "to eye a person brown". Do la vorto browneyed ĉi tie indikas nur adjektivon kaj ne eblas "a browneye". La samo por strongheaded kaj brownbodied kiuj ne venas el verbo to head a person strong nek to body a person brown. *Marcel Leereveld.*



3ZZZ Ĉisemajne Heather instigas la aŭskultantojn viziti la insulon King kaj malkovri ties ĉarmon.

Sciu ankaŭ kiel eblas kuraci homan haŭton per fiŝa haŭto



Informis la kunvokanto, *Franciska Toubale*

